

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Francalandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 25 fkoj
Bonfara : 30 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.Č.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO-APRILO

1976 2

KULTURAJ KAJEROJ

1976 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Por morgaŭ aŭ postmorgaŭ kiam la homoj kolonios la stelojn

La katedraloj

La Titio Bukar

La unua vizito ĉe Tolstoj V. Lebrun

Harfajnaj radiketoj G. Illyes

Por via distro.

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Ĉiam, kiam jus finiĝis iu studperiodo en Grésillon la respondeculoj staras inter du kontraŭaj sentoj : plezuro pri la fino de pezaj zorgoj ; bedaŭroj pri la fino de tre agrabla kunestado. La Printempa Semajno estis mezsukcesa pro tio, ke la celo ne estis atingita : la dudeko da junaj partoprenantoj estis francoj, nur du eksterlandanoj ĉeestis. Sed laŭ kultura vidpunkto tiu semajno estis plensukcesa. Ĉiuj zorge laboris eĉ ekster la kursoj.

Alia grupo laboris dum la dua semajno sed ne pri esperanto. Geamikoj kuniĝis por farbi, tapeti la murojn de la nove refaritaj ĉambroj. (Ĉiuj ĉambroj nun ricevas varman akvon). Granda laboro farita en la Grézijona etoso kutima. Dank'al tiuj sindonemaj laborantoj la someraj vizitantoj povos disponi pri kvar modernigitaj pliaj ĉambroj. Ankaŭ la prelegsalono estas tute ŝtoftapetita. Eĉ per paŝoj mallongaj kaj neregulaj ni iras la vojon antaŭviditan.

Kiuj el vi venos por konstati la novajn plibonigojn ? Multaj jam estas la aliĝoj. Senprokraste informiĝu. Dum la dua periodo ni estas certaj pri la partopreno de almenaŭ kvin prelegontoj. Pri la temoj ni ne povas jam nun skribi ; sed ili estos tiel diversaj kaj interesaj, kiel la antaŭajn jarojn. La kutimaj ekskursoj okazos sed parte al novaj vizitindaj lokoj. Ni jam preparis ekskurson tuttagan tra tri diversaj provincoj, kiu devus interesi ĉiujn ĉeestantojn. Ne forgesu, ke ankaŭ ĉijare la vetero estos bela kaj, ke la regiono estas mirinda ĉefe dum la somero. Kial do heziti ?

Esperanto tra la Mondo

Pri la Universala Kongreso en Ateno

— Seminario « Esperanto kaj lingvistiko » : Tiu seminario konsistos el kvar 90-minutaj aranĝoj kaj estos gvidata de D-ro John C. Wells, lekciisto pri fonetiko en la Universitato de Londono. La nombro da partoprenantoj estos limigita. Sinanoncojn oni direktu al la konstanta kongresa adreso en Roterdamo.

— La postkongreso sur la Egea Maro : La oficiala postkongreso estos en formo de krozado, kiu daŭros tri tagmezojn. Oni vizitos i. a. jenajn insulojn : Delos, Mikonos, Rodo, Kreto, Santorini.

Internaciaj seminarioj de K.E.R.

La komitato por eksteraj rilatoj de T.E.J.O. (Junulara Esperanto-Movado) organizas ankoraŭ en 1976 kelkajn internaciajn seminariojn por ne-esperantistaj kaj esperantistaj partoprenantoj, en Romo (28.5 — 3.6) : « Lingva demokratio : kio ĝi estas, kiu ĝin volas, kiu ĝin oponas ? » ; en Anglio, Reading-Universitato, 15 — 22.7 : « Lingvaj barieroj al orienta-okcidenta komunikiĝo, iliaj kaŭzoj kaj konsekvencoj » ; en Sarajevo, Jugoslavio (12 — 16.8) : « Lingvo kaj racismo » ; Germanio, Burg Wittlage (25 — 30.10) : « Politikaj motivoj kaj celoj en la lingva tereno ». Skribu al K.E.R., Riouwstraat 172, Den Haag 2011 Nederlando.

En la brita parlamento

Jam 55 britaj parlamentanoj aliĝis al la parlamenta Esperantogrupo.

Por la ŝak-ludantoj

Esperanta ŝak-Ligo internacia (E.Ŝ.L.I.), kunlaboranta foka asocio de U.E.A. jus eldonis sian E.Ŝ.L.I. - jarlibron 1975 kun listo de la membroj kaj 10-paĝa ŝakterminaro. Aĉetebla ĉe S-ro W. Loose, Wilhelmstr. 33, D-593 Schwelm, F. R. Germanio.

Kalman Kalocsay ne plu vivas...

La plej granda esperantista poeto, Kalman Kalocsay mortis la 27an de Februaro. Li naskiĝis en sia lando, Hungario, en 1891. Liaj unuaj originalaj poemoj aperis en 1921 sub la titolo : « Mondo kaj koro ». Lia verkaro entenas originalajn poemarojn, librojn, poemojn tradukitajn el multaj lingvoj, tradukaĵojn pri poezio : « Lingvo, stilo, formo » kaj « Parnasa Gvidlibro », prigramatikajn studojn, k.t.p...

Lia nomo restos ligita al la fama revuo « Literatura Mondo ». Kalocsay estas vere la patro de la moderna altnivela poezio en Esperanto.

Espereble, lia verkaro estos pli kaj pli legata kaj konata... de la esperantistoj mem.

Septembro en Svislando...

La 17a Europa Feriosemajno en Svislando okazos, de la 12a ĝis la 18a de Septembro, en Magliaso, apud lago de Lugano (ekskursoj, diversgradaj esperanto-Lecionoj, vesperoj, k.t.p...). Adreso : S-ro Ernst Glätti, Lauerstrasse 17, CH-5200 Brugg (Svislando).

... kaj en Bulgario

— Inter la 16a kaj la 26a de Septembro, Ora Esperanto-Feriado en Pamporovo, sub la aŭspicioj de Monda Turismo (ekskursoj, vizitoj, ktp...).

Internaciaj Someraj Universitataj Semajnoj en Primoŝten

Tiu aranĝo okazos de la 16a ĝis la 30a de Julio, en la fama Esperanto-banloko Primoŝten, ĉe la jugoslava adriatika marbordo inter ŝibenik kaj Split, kun la kadra temo : « ekonomiaj rilatoj kaj scienca kunlaborado en plurlingva Eŭropo ». S.U.S. laboros plurlingve kun tradukoj en Esperanto aŭ inverse. La 14-paĝa esperantlingva informilo estas ricevebla ĉe Eŭropa Klubo, Riemekestr. 62, D-4790 Paderborn, F. R. Germanio.

Enkonduka prelego en Esperanto dum scienca kongreso

Por la malfermo de la 8a kongreso de Internacia Asocio pri Kibernetiko (6 — 11a de Septembro), oni petis D-ron Frank fari la enkondukan prelegon. Tiu lasta konsentis, kondiĉe ke lia prelego estu farita en la Internacia Lingvo.

En Universitatoj

— La Esperanto-sekcio de la Universitato de Provence — Aix — Marseille, en Francio, volonte rilatas kun universitatoj aŭ superaj lernejoj kie Esperanto estas instruata. Skribi al Université de Provence section d'Esperanto (I.L.G.E.O.S.) 29, avenue Robert Schuman, F-13126 Aix-en-Provence.

— Ĉe la Universitato de Tartu (Estonio) funkcias supera kurso pri Esperanto. La kurs-finintoj rajtas provi ekzamenon.

Nacia eposo en Esperanto

Aperis « Kalevipoeg » de Fr. R. Kreutzwald, fragmentoj de la estona popola eposo, tradukita de la konata poetino Hida Dresen. La eposo flue rakontas en versoj la mitologiajn aventurojn de la heroo Kalevipoeg.

Oni scias ke la nacia eposo de la lingve « frata » popolo finna « Kalevala » ankaŭ aperis en la Internacia Lingvo.

En la Franca televido

La 26an de Marto, la 3a programo de la franca televido elsendis interesan informan programon pri Esperanto, en la rubriko « Libera Tribuno ».

Alvoko al meteorologoj-Esperantistoj

Grupeto jam arigis kelkajn el ili. Rilatu kun S-ro Jackson, 35, Hambleden Court, Harmans Water, Bracknell, Berkshire, Britio.

Por morgaù aù postmorgaù, kiam la homoj kolonios la stelojn

Konstanteno Tsiolkovski, rusa pioniro en astronaŭtiko diris : « La Tero estas lulilo de la Homaro, sed oni ne povas ĉiam resti en sia lulilo ».

Pro trologâteco, pro energio-nesufiĉeco, la Homo estas devigata pripensi sian pluvivadon. Antaŭvidi, ke, iun tagon, la homaro elmigros eksteron Teron kaj ĉerpos energion kaj vivrimedojn sur aliaj planedoj estas morgaŭa realeco. La plej famaj scienculoj de nia mondo tiucele kunvenas. La akcelo de la teknika evoluado permesas antaŭvidi tiun konkeron. Cetere, al la mankoj de Tero aldoniĝos alia danĝero : iun tagon, la Suno, ĉe fino de sia vivo, transformiĝos, kiel ĝiaj samspeculoj, en novaon. Tamen la astrofizikistoj opinias, ke almenaŭ 6 miliardoj da jaroj pasos antaŭ tiu transformiĝo.

Serĉado de energio

Profesoro A.-D. Oursoul, soveta epistemologiisto, rimarkas, ke, por daŭrigi sian progreson, la scienco pli kaj pli bezonas informojn pri la Spaco, kolektitaj en la Spaco mem.

N. S. Kardachev, soveta astrofizikisto, opinias, ke la civilizacioj spertas tri stadiojn, laŭ siaj energio-bezonoj.

En la UNUA Stadio, la teknologia nivelo estas proksima je la nia kaj la civilizacio trovas sian energion en sia propra planedo. En la Dua Stadio, la civilizacio estas pli evoluinta ; ĝi aranĝas sian Sunan sistemon por kapti la energion de sia stelo (stelo = suno).

Fine, en la Tria Stadio la civilizacio estas tiel kompleksa, ĝiaj energio-bezonoj tiaj, ke ĝi devas ĝin havigi al si el sia tuta galaksio. Kardachev pensas, ke, por atingi la fazon-I (la etapo en kiu ni estas) necesas nur kelkaj jarmiloj, maksimume. Kontraŭe, por pasi de la fazo-2 al la fazo-3 oni ŝajne bezonos nur kelkajn dekojn da jarmiloj (preskaŭ nenio, kompare kun la kosma skalo de la tempo).

Ni jam estas en la kosma erao


La unua sputniko en 1957, la unua paŝo sur Luno en 1969, kaj precipe la tri misioj SKYLAB (unu el la plej gravaj sciencaj eksperimentoj de ĉiuj tempoj) enirigis nin en la 2-an fazon. Jam la eksperimento Apollo-Soyouz ilustras la interkonsenton inter la sovetaj kaj amerikaj scienculoj por la konkero de la Spaco.

Al kiuj Spacaj estontecoj sin turnas la Homo ? Jam serioze oni okupiĝas pri la ĉirkaŭanta zono de nia globuso. Ek de 1980 la spaciala iradoreirado permesos alporti kaj kunigi la elementojn de orbitaj stacioj. Nia Tero naĝas en oceano de energio, kiun ni ne uzas. K. Ehrike pensas, ke oni baldaŭ instalos sur la Tera orbito sunajn panelojn por kapti la sunan energion. Peter E. Glaser, usona, plejdetale projektis tiujn sunajn panelojn, kiuj povus funkcii en la jaro 2 000. Tiuj gigantaj sunaj paneloj (kies potenco estus inter 3 kaj 15 G. V.) kolektus la sunan energion, kiu estus transformita en mikro-ondojn, kies faskoj estus direktataj al Tera Ricevo-Centralo. La energio kaptita de la antenoj, estus poste elektroigita.

Tio permesus eviti poluciojn inter kiuj la varmigadon de la riveroj kaj oceanoj, kiu riskas detrui la akvan faŭnon.

Ankaŭ oni povus loki sur la Teran orbiton multajn industriojn, kiuj povus, sur la loko mem, konsumi la sunan energion.

Gerard O'Neill, fizikisto en Princeton, inventis spacan insulon, senmovan, lokitan sur unu punkto de la sistemo Tero-Luno, kie la altiro de la du astroj ekvilibriĝas (estas la punkto de Lagrange). Tiu vera kolonio povus enhavi 10 000 personojn en 2 070. Laŭ G. O'Neill, la tiama tekniko kapablos ĝin instali en 1 980. Tiu scienculo kalkulis la koston de la konstruado ; ĝi egalas



tiun de la programo Apollo. La necesaj materialoj estus alportataj el Luno dank'al sistemo elektro-magneta, kiu profitus la feblan lunan graviton kaj la spacan vakuon. Evidente, tio supozas minajn ekspluatojn sur Luno. Por krei tiujn lunajn bazojn estus necese fabriki oksigenon je malalta prezo. Serĉistoj de la NASA starigis projektojn por havigi akvon kaj oksigenon al 10 000 personoj dum pluraj dekmil jaroj : dank'al la ilmenito kaj la oksidoj entenataj en la luna grundo. La projektoj pri lunaj bazoj estas multnom-

braj kaj la scienculoj opinias, ke, en la jaro 2 000 ekzistos kolonioj konstantaj aŭ semi-konstantaj, plej ofte enprofundigitaj en la luna subgrundo.

Kaj kiam Luno — kies surfac-amplekso proksimiĝas al tiu de Afriko — estos iĝinta nesufiĉa por kontentigi la Teranojn, necesos iri en aliajn planedojn. Tiuj, kiuj altiras niajn rigardojn estas Marso kaj Venusa.

Igi la planedojn loĝeblaj

Marso, la ruĝa planedo, jam de longe, vivigis la imagojn. Baldaŭ, eble antaŭ la jaro 2 000 ĝi ricevos la viziton de la homoj. W. von Braun estis jam antaŭvidinta trimonatan restadon sur la ruĝa planedo en 1985. Sed financaj problemoj prokrastis la plenumadon de tiu projekto.

Estas precipe Venusa, kiu interesas la scienculojn ; ĝia atmosfero entenas 90 % de karbona dioksido, mortiga por la homoj. Nu, antaŭ tri miliardoj da jaroj, nia globuso havis saman atmosferon. La tiamaj algoj bluaj, dank'al procezo de fotosintezo, disociis la molekulon CO^2 por liberigi la vitalan oksigenon O^2.

La Profesoro Carl Sagan, direktoro de laboratorio en la Universitato Cornell, opiniis, ke, imitante tion, kio okazis sur Tero, oni povas artefarite rekrei, sur Venusa, oksigenan atmosferon. Li proponas, ke oni forĵetu, sur Venusan, tunojn da bluaj algoj. La eksperimentoj faritaj en laboratorio pruvis, ke unu miliono da bluaj algoj pliigas la oksigeno-kvanton je 380 %.

Laŭmezure kiel la procezo de fotosintezo evoluos, la sunaj radioj penetros en la Venusan atmosferon kaj la nuna temperaturo de la Venusa grundo (400°) pliboniĝos. Oni pensas, ke tavolo de ozono formiĝos kaj protektos la Teranojn kontraŭ la ultraviolaj radioj.

F. J. Dyson pensas, ke tio ne sufiĉos : oni estos devigata sin turni al la suna sistemo mem.

Tute simple : disigi la planedon Jupitero — laŭ elekto : per eksplodo, per centrifuga forto, per termonuklea fandiĝo — kaj reuzi la materialojn, kiuj oni dispozicius ĉirkaŭ la sunon por formi ian sferon, kies diametro estus supera al tiu de la Tera orbito. Tiuj materialioj iĝus kolektiloj se suno-energio. Ankaŭ oni povus uzi Merkuron.

Precizajn kalkulojn oni jam faris por mezuri la energion, kiun oni bezonos por efektivigi ĉiun el tiuj projektoj. F. J. Dyson opinias, ke tiuj projektojn oni povus ekirigi antaŭ 2 500 jaroj. Li ankaŭ pensas, ke — eble — ni observas tiajn sferojn, konstruitaj de aliaj civilizacioj ; ili povus manifestiĝi, kiel fontoj de infraruĝaj radiadoj

Kun Dyson oni povas imagi, ke venos momento, kiam la suna energio ne plu sufiĉos ; tiam niaj malproksimaj posteuloj deziros konstrui aliajn sferojn apud la plej najbaraj steloj ; kaj, iom post iom, tuta reto de Dyson-sferoj instaliĝos en la tuta nia Galaksio.

Tiam nia civilizacio estos en la fazo-3, antaŭvidita de Kardachev. Kelkaj scienculoj jam pensas, ke kapti la radiadon de la steloj eble ne sufiĉos al tiaj evoluintaj civilizacioj. Carl Sagan kaj Yosif Chklovski, sovetaj astrofizikistoj, imagas, ke, tiam, oni devus esti kapabla eksplodigi la stelojn en supernovaojn, kaj reutiligante la elementojn, konstrui centojn da Dyson-sferoj.

Sed estas projektoj por tre malproksima tempo.

Nune oni ekvidas la eblon iradi en la sunan sistemon. Sed niaj nuntempaj scioj ne permesas precize projekti vojaĝojn al la plej proksimaj steloj.

Ni ne estu pesimistaj : antaŭ 2 500 jaroj la Egiptoj tute ne kapablis antaŭvidi vojaĝojn en « Jumbo Jet ».

Dinastio de robotoj

Verŝajne la homo estos antaŭirita kaj asistita de robotoj. Estas tio, kio jam okazas pri la aŭtomataj planedaj sondiloj. Nune Profesoro W. M. Whitney, usona, kaj liaj specialistoj, reguladas marsan roboton ; ĝi estos kapabla efektivigi — tute sola — sciencan laboron ; kaj, ne sin turnante al homa manipulisto, preni decidojn. La celo de tiu studo estas reguladi planedajn robotojn, kiuj (pro la pli kaj pli granda malproksimeco de la Tero) estos tute sendependaj de siaj homaj kontrolistoj.

Estas ankoraŭ pli mirinde

La matematikisto John von Neuman revas pri robotoj mem reproduktiĝantaj, kiujn oni esamenigus en la sunan sistemon. Por tiuj aŭtomatoj, dank'al al la matematikoj, li estis jam konscianta (eĉ antaŭ ol Crick kaj Watson malkovru ADN kaj ARN) la tri fundamentajn funkciojn karakterizantaj la reproduktadon de la vivantaj estaĵoj :

1) kolektado de la krudaj materialoj cele al registrado (ribozoj),

2) la mesaĝero skribas kaj donas la programon (polimerigado) ;

3) la programo permesas doni instrukciojn (ADN kaj ARN).

Por krei roboton, la kreanto devos — laŭ von Neuman — efektivigi 3 ĉefajn agojn :

1) doni al la Roboto ekzaktan priskribon de ĝi mem.

2) doni al la Roboto duan priskribon, tiun de roboto kiu jam ricevis la unuan priskribon ;

3) ordoni al la Roboto, ke ĝi kreu alian roboton korespondantan al la dua priskribo ; kaj ke ĝi donu al tiu nova kreaĵo saman ordonon K.T.P.

Tiel kolonioj de robotoj povus — tute solaj — helpi la homojn en iliaj kosmaj projektoj.

Kondiĉe, ja, ke ilia inteligenteco restos nur instinkto.


Kompreneble ĉio tio povas ŝajni freneza. Sed ni ne miskomprenu : la scienculoj, la veraj scienculoj, revas, kaj, inter si, diskutas pri tiu kosma estonteco de la homaro, kiu, ĉiamaniere estos ankoraŭ pli fantasta ol tiu, kiun la homoj povas nun imagi.

El « Scienco kaj vivo ».

La Katedraloj

La katedralo portas en si la krean potencon, la profundan spiriton, la teknikajn eblaĵojn, la talentojn de Mezepoko ; ankaŭ ĝian praktikan vivon, ĝian literaturon, ĝian politikon. La katedralo naskiĝis el longa ĝermado. La katedralo-konstruantoj havis malantaŭ si tutan estintecon. La ruiniĝo de la antikva Mondo ne detruis ĉiujn ĉefverkojn. La Romia materialismo liveris konstruaĵojn gigantajn, kvankam senanimajn ; sed ili pluigis materialan instruadon. Kaj venis la Barbaroj, kiuj brulis, rabis, mortigis ; ili konstruis fortresojn.

Tamen ĉirkaŭ la Jaro Mil oni komencis konstrui abatejojn por la monakoj kaj preĝejojn por la popolo. Inter 950 kaj la jaro mil oni konstruis 1108 abatejojn kaj preĝejojn : 326 en la 11-a jarcento kaj 702 en la 12-a.



Ŝajnas mirige, ke oni subite trovis ne nur la metiistojn kaj la skulptistojn, sed ankaŭ la Laboraĵajn Majstrojn, kapablajn pensi la bazilikon, materiale, intelekte kaj spirite. La sciado estis transdonita de la Benediktanoj. Benedikto de Nurcie naskiĝis en Italujo en 480. Li fariĝas monako kaj organizas la benediktan ordinon, kiu instaliĝas en Monto Kasino en 529. En tiu lando perturbita de la Barbaraj Invadoj, li entreprenas kunigi ĉiujn klasikajn manuskriptojn, kiujn aliaj jam ĝas herezaj. Tial li kreas la sciplenan tradicion benediktan, kiu ne ĉesos. Li kaj liaj posteuloj ankaŭ kolektas la antikvajn skulptaĵojn. Kiam la Monto Kasino estas unuafoje detruita de la Barbaroj (la dua en 1341 de tertremo — la tria de la usonaj bomboj — sed ĉifoje rekonstruita de la Usonanoj mem) tio, kion la monakoj unue savas estas la manuskriptoj, kiujn ili transportas al Romo. Estas la benediktaj monakoj, kiuj, la unuaj — antaŭ la araba vojo — konigis al ni Platon kaj Aristote, Euclide kaj Pythagore, kaj la helenistikajn Aleksandrianojn.

Estas ili, kiuj ricevis de la Romianoj kaj de la Bizancanoj la principojn de la ŝton-konstruado, el kiuj ili kreis la Romanikan Arton. Romo donis la planon de siaj bazilikoj kaj Bizanco la riĉecon de la dekoroj. La ĉiutaga 7-hora manlaborado la pacienca serĉado de la tradicioj, la matematika kono senĉese perfektigita, permesis al la monakoj de S-to Benedikto retrovi kaj transdoni la « iniciadan » scion de la metioj.

La konstruado de la katedraloj estas samtempa kiel gravaj eventoj kaj prestiĝaj nomoj : St Bernard, St Francisko de Asizo, Abato Suger, Philippe Auguste, St Louis, Frederiko Barbaroso, Frederiko la 2-a, Vilhelmo la Konkeranto, Godefroy de Bouillon, La Cido, la Papoj Gregoro la 3-a kaj Inocento la 7-a, Roĝero Bacon, Duns Scot, Dante, Giotto. Estas la periodo de la Grandaj Pilgrimoj, de la Krucomilitoj, de la luktoj kontraŭ la Maŭroj de Hispanujo, kontraŭ la paganaj civilizacioj de Skandinavio, la epoko de la epopeoj, de la ĝestokantoj. Dume la Papeco stariĝis kontraŭ la Reĝoj kaj la Imperiestroj. Dum tri jarcentoj la Okcidento aperas kiel vasta konstruado-entrepreno : Noyon, 1140 — Angers, 1145 — Le Mans, 1150 — Senlis, 1153 — Laon, 1160 — Poitiers, 1162 — Sens, 1168 — Bayeux, 1175 — Agde, 1180 — Bourges, 1192 — Chartres, 1194 —. Pli poste : Reims, Amiens, Troyes, Mt St-Michel, la Ste Chapelle.

La skulptistoj, per mano mallerta, sed tiel kortuŝa, provas retrovi la perditan sekreton de la formoj ; la kapiteloj florigas, supre de la kolonoj, barbaran, stilizitan flaŭron kaj faŭnon. La freska pentraĵo komencas elvoki, sur la muroj de la sanktejoj, la paĝoj de la du Testamentoj. Kaj la unuaj vitraloj aperas ĉe la fenestroj kaj « elvokas ĉiajn historiojn ».

Ĝis 1200 la arto estas precipe monakeja ; la abatejo antaŭas la katedraloj. La giganta abatejo Cluny (Klunizo) kun siaj preĝejturoj, starigita inter 1088 kaj 1230 estis stulte detruita en la 19 jarcento ; ĝi inspiris Vezelay (1140), Jumièges, Caen, Fecamp, Fleury — kaj St Denis sub la direktado de la abato Suger (li estas filo de servutulo ; lia nura valoro portis lin sur la unuajn rangojn de la Franca reĝejo en teologio, politiko kaj diplomatio). De kelkaj abatejoj, oni povas ankoraŭ hodiaŭ admiri la ĉambron de la kanonikaro, la vizitejon, la manĝejon, la kuirejon — kaj la klostron, trankvilan meditadejon. Ekde la 12-a jarcento la sociala kaj politika evoluado donis ĉefan rolon al la urboj, malprofite al la kasteloj kaj monakejoj. La katedralo postsekvis la abatejon.

La ambicio de la konstruantoj grandiĝas. Provinte la rondan preĝejon (Germigny-les-Prés, Ottmasheim en Alzaco) ili prefere inspiriĝas de la baziliko pli vasta. Oni estis relerninta bone haki la ŝtonon por fari murojn tiel netajn kiel tiujn el brikoj. Oni kreis navon flankitan de flankaj navoj ; la elekto de la transepto donas al la ensemblo formon de kruco, jam ekzistantan en la antikvaj bazilikoj. Ĉar la preĝejo iĝis pli alta estis necese trovi alion ol la antikva kolono ; kaj oni aranĝis la ŝtonon en pilieron. La navo tuj plilarĝiĝos, plialtiĝos ; dume la turoj kaj la sonorilejoj, kiuj ekzistis de pluraj jarcentoj, sed apartigitaj de la fasado, integriĝis en ĝin, donante al ĝi pli da majesteco. Tiu grandigo alportis problemon, tiun de la kovraĵo. La malaltaj plafonoj de la romiaj bazilikoj ofte montris luksegan dekora-

cion. Sed la longeco de la lignaj traboj limigis la larĝecon de la navo ; plue ili estis predo por la fajro. La ŝtona volbo, kiun la Romianoj estis ricevintaj de Oriento, longtempe forgesita, reaperis, modesta, ĉe la Karolidaj tempoj (malgrandaj, malaltaj volboj de Jouarre, Venasque, St-Laurent de Grenoble, la « cul de four » de la baptejo en Poitiers. Volbi estis alĝustigi la ŝtonojn, antaŭe kalkitaj, tiamaniere ke kiam la skafaldo estas forprenita, ili tenas per sia propra pezo. La procedo estis pli kosta ol la ligna kovraĵo sed ĝi protektis kontraŭ la fajro. Du tipoj de volboj hereditaj de la Romianoj estis uzataj de la Romanikaj arkitektoj : la volbo korbansa (ekzakte duoncilindra) kaj la eĝo-volbo, konstituita el kvar konveksaj fakoj, kiuj apogas sian bazon sur subportiloj. La terura manko de tiu romanika volbo estis, ke tiu enorma amasigo de hakitaj ŝtonoj multege pezis, eĉ kiam oni plifortigis ĝin per transversaj arkoj. Tiu maso tendencis malproksimigi la murojn de la konstruaĵo (la preĝejo de la abatejo Bec tri fojojn renversiĝis en cent jaroj) Oni estis devigata plifortigi la murojn; oni faris ilin pezaj, dikmalaltaj, por ke ili povu facile porti la tunojn de kalko-ŝtono aŭ granito de tiu kovraĵo. Sed kiamaniere malfermi fenestrojn en tiuj muroj dikaj je 1 m 50 — 2 metroj.

La volbo ne ĉie estis adoptita ; laŭ la ekzemplo de Sta Sofia en Konstantinopolo kaj de Sto Marko en Venecio, oni preferis la kupolon (Perigueux, Souillac, Angoulème).

Ĉio, kio estis transdonita de la pasinteco aŭ alportita de la pilgrimantoj, komercistoj, krucistoj, kontribuis krei romanikan arton tre diversigita : estas epoko de serĉado kaj kreado. La romanikaj preĝejoj malmulte similis unu la alian. Estis unue Cluny. Conque, Caen, Cologne, Pise. Dua ondo liveris Vezelay, Autun, Perigueux, Salamanque, Parme kaj sur la vojo al St-Jacques de Compostelle : St-Martial de Limoges, St-Sernin de Toulouse. Aŭvernio uzis siajn grejsojn, siajn lafojn, siajn kalkoŝtonojn kaj granitojn, siajn arkozojn. Hispanujo preferis la brikojn kaj Italujo dekoraciis per marmoro. En Bourgogne, la navoj iĝis pli kaj pli altaj. En Jumièges, Vezelay, Paray-le-Monial jam la gotika arto anonciĝis. En Britujo, jen Lincoln, Winchester, Durham, Cantorbery ; ili estas belegaĵoj. En Norvegujo, Sta Maria de Bergen. En Germanujo : Worms, Mayence, Spire. En Saksujo, en Pollando, en Danujo, en Svedujo, la romanika arto radias je potenca originaleco.

Por trakonduki tiujn samtempajn konstruadojn estis necese financi la laborojn, nutri kaj loĝi la tre multajn laboristojn. « Kelkfoje mil personoj, viroj kaj virinoj, tiris la ĉaron tiom multe peza estis la ŝarĝo ». La reĝoj, la nobeloj, la riĉaj burĝoj alportis larĝajn monoferojn ; oni kvestis en la urbo kaj en la ĉirkaŭaĵoj ; kelkfoje malavara donacinto transprenis parton de la konstruado ; la vitristo donacis tutan vitralegon. Estis admirinda impeto de tuta popolamaso pia, kiu esprimis sian fidon. Serve al tiu granda fido necesis lertaj manoj ; estis tiuj de la laboraĵaj Majstroj, de la ŝtonhakistoj ; ofte estis la samaj personoj, kiuj iĝis skulptistoj dum vintro. Multaj lasis sian nomon sur unu parto de la konstruaĵo : en kelkaj preĝejoj, ĉe la navkruciĝo, stranga slabaro, La Labirinto, inkrustita de nigra marmoro aŭ de plumbo, portas la nomon de la Laboraĵa Majstro. Aliaj Majstroj estas entombigitaj en la preĝejo mem. Kelkaj elmigris : Guillaume de Lens al Cantorbery ; majstro Jean Mignot al Milano, Jean Langlois al Chypre.

Ankaŭ kelkaj famaj skulptistoj lasis sian nomon : De Villard de Honnecourt (meze de la 13-a jarcento) oni retrovis lian personan not-kajeron : 33 malnovaj folietoj el pergameno ; hodiaŭ en la Nacia Biblioteko. Li skribis pri Reims, St-Quentin, Chartres, Meaux, kiujn li vizitis. Li notis observadojn, ideojn, krokizojn : unu fenestro de Reims, la Turo de Laon, unu leono krokizita per kvar strekoj ; kelkaj personoj : ĵonglistoj, soldatoj, klerikoj, muzikistoj laŭ diversaj sintenoj.



La katedralo ne estas verko de sensciulo. Jam Suger uzis la Ekzatajn Sciencojn por kalkuli la desegnaĵon de la volboj kaj oni retrovis sur la muroj de la katedraloj en Clermont, Limoges, Narbonne, Reims, Strasbourg kaj aliaj geometriajn desegnaĵojn, kiuj montras, ke matematikoj, spaca geometrio, trigonometrio estis jam konataj. Antaŭ ol esti ŝtonstarigita, la katedralo estis desegnita en la « ĉambro de la strekoj » ĉe la Laboraĵa Majstro per strekilo, ortilo, kaj cirkelo. Kaj oni ne povas ne elvoki tiun bildon, kiu figuras sur la « Biblio moraligita » de Vieno ; ĝi reprezentas la Grandan Arkitekton mezurantan la Universon per cirkelo. En la Genezo la Eternulo diras : « Mi faris la Mondon per Mezuro, Nombro kaj Pezo » ; tio signifas, ke ĝenerala fizika leĝo ekzistas, reganta la ensemblon de la Universo, el kiu nur kelkajn pecetojn nuna homa scienco posedas.

Tiu prepara laboro ekzistis por la skulptado. Sur la krokizoj de V. de Honnecourt, la korpoj estas dispartigitaj en geometriajn figurojn (trianguloj, konusoj, paralelepipedoj) ; la stereotomio, malfacila scienco de la hakita ŝtono, hodiaŭ estas perdiĝanta ; la leĝoj de la rezisteco de la materialoj (ligno kaj ŝtono) estis ankaŭ bone konataj ; oni sciis ankaŭ protekti la lignojn, kiuj ekde la 13-a jarcento venis ĝis ni nedifektitaj.

el Daniel Rops.

LA TITIO

Skeĉo de BUKAR

Dekoracio

Labor-ĉambro de uzinestro.

En la mezo, granda skribo-tablo fronte al la publiko : sur ĝi : telefono, panelo de vok-butonoj, ktp. ; ĉe la fono : granda fenestro, tra kiu oni vidas parton de la uzino ;

ie ajn : pordo.

Roluloj :

S-ro RAKUR : nova uzinestro ; impona, regema.
S-ro LIMIC : asistanto de la uzinestro ; servema, eĉ sklavema. (tiun ĉi rolon povas eventuale ludi virino)

(Eniras **RAKUR** kaj **LIMIC**).

LIMIC — Jen via labor-ĉambro, sinjor' Rakur. Kiel vi vidas, ĝi estas granda, luma, oportuna... tra tiu ĉi fenestro vi povas rigardi vian uzinon... La antaŭa estro estis tre kontenta pri ĝi, sed, kompreneble, se vi deziras, ke mi ŝanĝu la meblaron, mi staras je via dispono, sinjor' Rakur. Mi estas via asistanto, same kiel mi estis la asistanto de la antaŭa uzinestro. Ion ajn vi bezonos mi klopodos havigi al vi kiel eble plej frue ! Mia rolo ĉi tie estas vin servi, sinjor' Rakur ! Ĉiufoje kiam vi volos, ke mi venu, nur premu la butonon apud mia nomo (li montras la panelon de vok-butonoj), tiun ĉi butonon... apud mia nomo (li montras la panelon de vok-butonoj), tiun ĉi butonon... apud mia nomo « Limic », mi tuj alkuros tien ĉi.

RAKUR — Dankon, Limic ! (li sidiĝas ĉe la skribotablo, vizaĝe al la publiko). Ne zorgu pri tiu labor-ĉambro, mi uzos ĝin tia, kia ĝi estas... almenaŭ en la komenco ! Poste, eble mi decidos aĉeti pli modernajn meblojn... Sed nun la plej urĝa tasko estas restarigi bonan, efikan funkciadon de la uzino. Kiel vi scias, Limic, la antaŭa posedanto estis devigita vendi ĝin por eviti bankroton. Mi aĉetis ĝin, ĉar mi opinias, ke oni povas savi ĝin. Kaj mi ja intencas savi ĝin ! Por tio mi kalkulas je via helpo, Limic !

LIMIC — Vi certe povas kalkuli je mia helpo, sinjor' Rakur. Mi estas via asistanto ; mia rolo estas vin servi, sinjor' Rakur ! Ĉiufoje kiam vi volos, ke mi ve...

RAKUR — Mi premos la butonon apud via nomo. Sciu, ke mi tre ofte premos ĝin.

LIMIC — (kurbiĝas) — Mia rolo estas vin servi, sinjor' Rakur !

RAKUR — Unue mi volas vidi la kontojn. Limic, bonvolu venigi la ĉef-kontiston !

LIMIC — Ha ! Tio ne estas ebla, sinjor' Rakur.

RAKUR — Kial tio ne estas ebla ?

LIMIC — Ĉar mi ne scias, kie li estas, sinjor' Rakur !

RAKUR — Vi ne scias, kie li estas ! Ĉu li ne estas en la kont-oficejo ?

LIMIC — Tie li estis antaŭ du semajnoj, sinjor' Rakur ; sed li subite malaperis, kaj oni ne plu revidis lin.

RAKUR — Sed vi nepre devas serĉi lin !

LIMIC — Ho ! Mi jam serĉis lin, sinjor' Rakur ! De kiam li malaperis mi serĉadas lin. Ne nur por retrovi lin, sed ĉefe por retrovi la monon, kiu malaperis samtempe kiel li !

RAKUR — Kio ! La ĉef-kontisto malaperis... kun la mono !

LIMIC — Jes, sinjor' Rakur. Ho ! Tio devis fatale okazi. Tiu ĉef-kontisto jam ŝtelis de sia antaŭa estro. Li estis dungita ĉar, elirante el karcero, li devis esti kontenta per tre malalta salajro.

RAKUR — Limic, morgaŭ matene mi volas havi ĉi tie novan ĉef-kontiston honestan... nepre honestan ! Trovu tian ĉef-kontiston !

LIMIC — Mi trovos tian ĉef-kontiston por vi, sinjor' Rakur ; vi povas kalkuli je mi ! Sed mi devas averti vin, sinjor' Rakur, ke por havi tian ĉef-kontiston vi bezonos pagi al li tre altan salajron, kaj kun la impoŝtoj, la socia asekuro...

RAKUR — Mi pagos al li altegan salajron ! Mi ne marĉandas ! Iru serĉi, Limic !

LIMIC — Jes, tuj, sinjor' Rakur ! (li kurbiĝas kaj eliras).

RAKUR (sola) — Kia kaĉo !
(oni aŭdas teruran eksplodon).

RAKUR — Kio estas ?
(RAKUR premas butonon ; LIMIC haste eniras).

RAKUR — Limic, kio estis tiu bruego ?

LIMIC — Ho, sinjor' Rakur, la laboratorio ĵus eksplodis.

RAKUR — La laboratorio ĵus eksplodis !

LIMIC — Jes, sinjor' Rakur. Ho ! Tio devis fatale okazi. La ĉef-kemiisto ne estis atentema ; li ĉiam revadis ! Li estis dungita ĉar, pro lia neatenteco, li devis esti kontenta per tre malalta salajro.

RAKUR — Limic, morgaŭ matene mi volas havi ĉi tie novan ĉef-kemiiston atenteman... nepre atenteman ! Trovu tian ĉef-kemiiston !

LIMIC — Mi trovos tian ĉef-kemiiston por vi, sinjor' Rakur ; vi povas kalkuli je mi ! Sed mi devas averti vin, sinjor' Rakur, ke por havi tian ĉef-kemiiston vi bezonos pagi al li tre altan salajron, kaj kun la impoŝtoj, la socia asekuro...

RAKUR — Mi pagos al li altegan salajron ! Mi ne marĉandas ! Kaj maldungu tiun mallertulon ! Tuj ! Mi ne plu volas vidi lin ĉe tie !

LIMIC — Ho, vi ne bezonas maldungi lin, por ne plu vidi lin, sinjor' Rakur !

RAKUR — Kio ?

LIMIC — Vi ne plu vidos lin tie ĉi, nek ie ajn ! Ankaŭ la laboratorion vi ne plu vidos. sinjor' Rakur ! Vi bezonos konstruigi novan !

RAKUR — Konstruigi novan laboratorion, Limic ! Iru, Limic !

LIMIC — Jes, tuj, sinjor' Rakur ! (li kurbiĝas kaj eliras).

RAKUR (elstaras, paŝas al la fenestro kaj rigardas eksteren) — Kia kaĉo, kia kaĉo !

(RAKUR turnas la dorson al la fenestro, paŝas al la publiko ; oni aŭdas anhelon de vapor-lokomotivo ; la bruo pli kaj pli kreskas, kvazaŭ la lokomotivo alproksimiĝus) VOĈOJ EL EKSTERE — La lokomotivo ! Haltu ! Haltu ! Bremsu ! Bremsu !

(oni aŭdas fortegan baton kaj bruon de rompego ; RAKUR kuras al la fenestro, rigardas eksteren kaj malsupren ; li revenas al la skribo-tablo, premas butonon ; LIMIC haste eniras).

RAKUR (montras la fenestron) — Limic, kiu estas tiu stultulo, kiu ĵetis sian lokomotivon kontraŭ la domon ?

LIMIC — Li nomiĝas Ludoviko, sinjor' Rakur. Ho ! Tio devis fatale okazi ; li estas ebria ekde la frua mateno ĝis la vespero. Pro tio li estis maldungita de la fervojokompanio kaj dungita ĉi tie, ĉar kiel ebriulo, li devis esti kontenta per tre malalta salajro.

RAKUR — Limic, tuj maldungu lin kaj trovu sobran lokomotiv-kondukiston !

LIMIC — Mi trovos tian kondukiston, sinjor' Rakur : vi povas kalkuli je mi ! Sed mi devas averti vin, sinjor' Rakur, ke por havi tian kondukiston vi bezonos pagi al li tre altan salajron, kaj kun la impoŝtoj, la socia asekuro...

RAKUR — Mi pagos al li altegan salajron ! Mi ne marĉandas ! Iru, Limic !

LIMIC — Jes, tuj, sinjor' Rakur ! (li kurbiĝas kaj eliras) (la telefono sonoras : RAKUR levas la aŭskultilon).

RAKUR. — Alo ! (karese) Mi kisas vin, karulino ! Kiel vi fartas ? Ĉu vi ne plu havas kapdoloron ?

.....

Ho, ve !

.....

Jes, mi vizitis ĉion, sed estas multaj aferoj ordigotaj.

.....

Ne, ne, mi ne bedaŭras, ke mi aĉetis ĝin. Baldaŭ mi gajnos per ĝi multe, multe da mono, kaj povos dorloti vin, anasido mia !

.....

Ne, ne, mi ne forgesis, ke morgaŭ estos la datreveno de nia edziĝo !

.....

Ion ajn, kiun vi volos kiel datrevenan donacon vi havos, kolombeto mia !

.....

Kion vi volas ? Tition !

.....

Ha ! Karulino, tiaj bestoj estas vera pesto en domo ; ili forŝiras tapetojn, kurtenojn, vestaĵojn... ili fekas, ili stinkas...

.....

Ne, kateto mia, vi ja scias, ke mi amadas vin, sed...

.....

Ha, ne ! Ne ploru, mia bebeto !

.....

Se vi volas tition, vi havos tition !

.....

Jes ! Mi promesas !

.....

(li kisas la telefon)

Ne tro laciĝu, mia leporeto... Jes, iomete siestu post la tagmanĝo... ĝis la, diino mia ! (li remetas la aŭskultilon) Tition ! Ha ! Kiam virino volas ion...

(RAKUR premas butonon ; LIMIC haste eniras)

RAKUR — Limic, morgaŭ matene mi volas havi tition. Trovu tition !

LIMIC — Mi trovos tition por vi, sinjor' Rakur ; vi povas kalkuli je mi ! Sed mi devas averti vin, sinjor' Rakur, ke por havi tition honestan, atenteman kaj sobran, vi bezonos pagi al li tre altan salajron, kaj kun la impoŝtoj, la socia asekuro...

FINO

LA UNUA VIZITO ĈE TOLSTOJ

Frumatene mi forlasis la vagonaron ĉe stacieto Jasenki ses kilometrojn de Jasnaja Poljana. Apenaŭ ektagiĝadis. Mi troviĝis nun ĉe centro mem de la Eŭropa Rusio, kiun mi konis ĝis tiam nur el geografia kurso de Vladivostoka liceo. Ĉio ĉirkaŭ dezerte silentas. Malaltaj sed larĝegaj montetoj en la potenca ritmo ondegkuŝas en vico de larĝaj bedegoj. Kiel senmovigitaj ondegoj de iu kolosa oceano, ili foriras trans horizonton. Tre longaj rektangulaĵoj de plugitaj kampoj seninterrompe kovras ilin. Aliloke el malproksimo, kiel muroj bluiĝetas tra matena nebuleto la ŝtataj kaj bienulaj arbaroj.

Jam nur horo de piedirado distancigas min de la granda Tolstoj ! Pakaĵon mi tute ne havas., do por ne perdi tempon mi tuj daŭrigis mian longan vojaĝon. Tio ne plibeligas mian kostumon. Laŭ la tolstojaj principoj oni per nenio devis malsimiliĝi de la popolamasoj. Kaj mi estis vestita ĉiam kiel kamparanoj junuloj : blanka ĉemizo super la pantalono pendas preskaŭ ĝis genuoj. Sur ĝi senmanika bruna fustena vesteto de mia eltrovo. Griza pantalono estas jam sufiĉe eluzita, kaj lana ĉapeto ne tro konformas al varma sezono.

Kiam mi alproksimiĝis al la du turetoj montrantaj la eniron en Jasnaja, la radioj de leviĝanta suno diselŝprucis el post horizonto kaj eklumigis grandan diglagon kaj jarcentajn tuliajn aleojn.

Supre ĉe l'fino de longa aleo ĉarmige nuancis blanke kaj roze granda duetaĝa domo.

Mi sidiĝis sur la benkon antaŭ la longa verando. Kaj por sekiĝi etendis miajn piedojn al la sunradioj. Fine mi estis trafinta mian celon, la mondo de libroj, la mirinda mondo de l'arto, kaj de l'revo, la sola konata de mi ĝis tiam komencis iĝadi por mi palpebla realaĵo !...

Subite alta homfiguro en velŝtofa nokta surtuto aperis ĉe balustrado. Longa duonigita blanka barbo. Paro da malgrandaj okuloj akrege pririgardas min kun vigla streĉa atento. Mi alproksimiĝas kaj vigle diras « Bonan tagon, Leo Nikolaido ! ».

— Mi ne scias, kiu vi estas — diras Tolstoj responde.

Elbrusta agrabla voĉo, sed kun rimarkebla laceceto. /Vere multege estas preterpasantoj, kiuj ĉiutage alvenas ĉitien antaŭ la verandon.

Emociite mi diras mian nomon — mi estas Lebrun.

— Eble vi memoras ? El Valdivostoko ? Mi skribis al vi...

— Kiel do ! Mi memoras. Mi memoras. Mi estas tre ĝoja vin vidi !... Mi estas tre ĝoja vin vidi !... Sed kiel do vi tien-ĉi trafis ? ! Li rapide malsupreniras renkonte kaj afable prenas mian brakon.

Ni iras la domon. Hejmo jam de longe konata laŭ libroj. Antikvaj pezegaj arkaĵoj. Fenestro troviĝas pli alte ol la homa kresko. Muroj dikaj unu metron. Duobla pordo. La ekstera mondo ne atingas ĉi-tien. En la angulo, falĉilo, ŝovelilo, segilo pendas sur la muro. La meblaro estas pli ol simpla. Tiu-ĉi estas la laborejo de l'grandega verkisto.

— Jen kelkaj libroj. Restu ĉi-tie. Mi tuj iros bani min.

Mi distrite trarigardas la broŝurojn. Rusaj eldonaĵoj de la « Libera Parolo » de W. Certkov en angulo.

Sed legi tuj mi ne kapablas.

Homo, kies animon, kies opiniojn, mi penegis diveni el liaj libroj nun estas ĉi-tie, apud mi, atingebla al mi senpere. Sed kiel eblas per kelkaj vortoj komuniki al li la amason da pensoj kaj problemoj, kiuj akre staras antaŭ mi. Pensoj kiel netenebla tereno turniĝas en mia kapo. Mi estas tiel ekscitita, ke mi tute forgesas, kie mi troviĝas.

Pluraj diversaj fortoj, kun la tuta energio de l'juneco, tiris tiam min for de la batitaj vojoj de cirkaŭanta min socio. Kaj la libroj de Tolstoj aldonis novan potencan puŝon je tiu direkto. Mi elkraĉis la « mondon ». La « mondon » kompatinde burĝan, mensogan, kruelegan, senlime stultan kaj malhonestan ĝis abomeno ! De mia tuta estaĵo mi malamegas ĝin kaj mi neniel volus reveni al ĝi. Mi ne volas esti venkita de li. Mia nomo estas Victor. Signifas venkinto. Mi volas lukti, batali ĝis morto. Mi volas venki. Sed kiel ? Sed kien iri ?...

La inĝeniera kariero estis tiam al mi garantiita. Princo Hilkov, ministro de fervojoj estis amiko de mia patro. Sed mi ne volis ĝin. Mi volis bruligi miajn ŝipojn. Por ĉiam rompi ĉiajn rilatojn kun la vivo de la privilegiita klaso. Foriri ! Sed kien ? Kion fari ? La praktikan vivon mi tute ne konis. Mi estis bona rusa gimnaziano de 1899. Mi bonege sciis parkere la malregulajn verbojn de la antikva greka lingvo. Mi perfekte konis la uzadon de la subjunktivo en la latina. Sed kia maniere oni eblas honeste gajni sian nutradon nek trompante, nek ekspluatante iun, pri tio mi ne havis eĉ plej malgrandan ideon. Kion do fari. Kion entrepreni ? Per kio komenci ?...

La voĉo de Tolstoj ektremigis min.

— Ĉu vi enuis, kompatinduleto ? Iru ni trinki teon. Kian aĝon do vi havas ?

— Dekok jarojn.

— Ho, kiel juna vi estas. Kaj kiel tio estas dangera. Kaj kun via juneco tiaj fortikaj konvinkoj ?... Ĉu vi jam de longe komencis legi miajn librojn ?

— Pli ol de unu jaro.

— Kaj kion do ? Ĉu viaj ideoj ŝanĝiĝis de tiam ?

— Kiel diri al vi ? Mi fariĝas tre malkontenta pri mi mem.

— Nu tio estas samtempe bona kaj malbona Sed kion do vi pensas fari ?

— Mi volus labori... Plej bone kulturante la teron, diris mi timete. — Daŭrigi la lernadon mi ne povas. Ne pro la manko de kapableco, kontraŭe mi lernadis bonege. Sed pro sensenceso de nia riĉk-

lasa instruado la lernado estis al mi morale tro peniga. Same estis rilate al la oficoj, kontaraj kaj ĉiaj. Mi ĉiam aspiris vivi libere, sendepende kaj malproksime de la urbo.

— Jes, jes, certe. Nutri sin per la produktoj de sia ĝardeno kaj de sia kampo estas plej bona vivmaniero, sed samtempe al la naturo, plaĉis, ke tio ĉi estu la plej malfacila. Por fari tion oni devas ofte vivadi kiel kamparano — malpure, kun pedikoj, nutrante sin nur per pano kun bulbo.

— Sed eble tio tamen estas atingebla ?

Mi perfortas min por eldiri tion.

— Jes. Mi ankaŭ ĉiam celadis ĉi-tion. Sed iafoje tio-ĉi ne estas ebla... Mi tute ne volas diri, ke la kompromiso ĉiam estas necesa.

— La kompromiso alvenos MEMSTARE.

— Estas ĝuste tio kion mi volus diri. En sia penado al progreso ĉiu el ni havas haltigilon. Kaj kiam du fortoj agas laŭ diversaj direktoj, la movo fariĝas laŭ la diagonalo. Tiu-ĉi estas « la paralelogramo de l'fortoj »... Vi scias ? Por vi kun patrino ankoraŭ ne estas tiel malfacile... Sed tamen, se ne estas eble labori, oni devas akcepti tiun maleblecon.

— Nu, tiuokaze mi akceptas iun oficon... Sed antaŭe mi provos manlaboron.

Mi provos ĝin tutforte ! Bonege !

Matenmanĝo estis finita. Tolstoj leviĝis.

— Leo Nikolaido, mia patrino skribis al vi leteron. Sed ŝi skribis ĝin ĉe la lasta minuto kaj sukcesis nete transskribi nur duonon. La lasta estas skribita krajone...

Letero estas skribita france. Ni sidiĝas kaj legas ĝin kune.

« Mi alveturis Moskven nur por esprimi al vi sentojn de elprofunda estimo kaj konatigi al vi mian filon, kiu skribadis al vi el Vladivostok. Vi loĝas tiel malproksime, ke bedaŭrinde al mi ne eblas viziti vin. Mi direktas al vi mian filon. Estas superflue diri, kiel tiu knabeto estas entuziasmigita de vi, /kaj ĉu li estas la sola ! /Li avide englutas viajn verkojn kaj vivas nur pere de vi. Bedaŭrinde li ĵus perdis sian patron, kaj mi, estas necese konfesi tion, ne ĉiam sentas min sufiĉe sperta por gvidadi lin. Li havas feran volon. Li ne manĝas viandon, trinkas nek teon, nek kafon, kaj estas necese petegi, ke li manĝu ovon aŭ trinku lakton. Somere li insiste surmetas lanan ĉapon kaj, malgraŭ miaj petegoj kaj larmoj, ne konsentas aĉeti al si ĉapelon. Pardonu al mi tiujn bagatelojn. Mi mencias ilin, ke vi pli bone elkonu lin. Ĉe liceco li iam estis la plej bona lernanto, pasante de unu klaso al la alia sen ekzamenoj kaj kun unuagrada rekompenso...

Mi sendas lin al vi kun peto kelke anstataŭi la patron kaj helpi al li per viaj bonaj konsiloj trovi al si bonan vojon meze de nia malĝoja travivado... Li estas ĉe mi la sola en la mondo... k.t.p. ».

— Nu, kion do ? Estas bonega letero. Via patrino konas la rusan ? Mi respondos al ŝi... Kaj mi iros okupiĝi, sed je la dua estas tagmanĝo.

Antaŭ la tagmanĝo, Leo Nikolaido alvenis videble laca.

Blanka ĉemizo estis malfermita ĝis la zono.

Ni iru iom promeni. Mi tro laboris hodiaŭ. Per sia neordinare delikata gesto li prenas mian brakon.

— Jen kion mi pensis pri vi. Tie ĉi je kvin kilometroj de ni loĝas Mario Aleksandridino Smit. Tre rimarkinda virino. Ŝi antaŭe vivadis tre riĉe kaj lukse. Sola ŝia pelto kostis mil rublojn (1). Kaj jen, kiam ŝiaj konvinkoj « ŝanĝiĝis », ŝi ĉion disdonis, instruiĝis labori ĉe la vilaĝanoj kaj jam de longe vivas kampare tute sola kaj nutras sin per sia laboro. Ŝi vendas lakton, berojn iom da legomoj, kaj ĉi-tio estas ŝia tuta gajno. Oni devas alkonduki vin al ŝi. Por vi tio estos interesa, kaj mi ankaŭ jam de longe ne vidis ŝin.

Ĉe la longa manĝotablo Leo Nikolaido montris al mi lokon apud si.

En la manĝoĉambro, laŭte susurante per silka jupo kaj nerve movante la kubutojn, eniris Sofio Andreidino.

Mi leviĝis.

— Vi, ŝajne, estas alveturinta de tre malproksime ?

— Rekte el Moskvo, kaj Moskvon el Vladivostoko.

— Jen ! Vi tiom multe vojaĝas. Tio-ĉi estas interesa. Sed tie-ĉi ? Kio do vin interesas ?

— Ĉi-tie ?... Leo Nikolaido.

— Nu, Leo Nikolaido, ĉi-tio estas ne multe — kaj ŝia tuta ĝojovigleco tuj malaperis.

Dum miaj sekvantaj vizitoj ŝi etendadis al mi nur du fingrojn kaj preskaŭ ne parolis kun mi.

Mi estis al ŝi « mallumulo », kiel ŝi nomis la samideanojn de sia edzo.

Kaj al ili ŝi estis tre malfavora.

Kondukante min al Fraŭlino Smit, Leo Nikolaido nomis la ĉeestintoj de l'tagmanĝo.

— Sed la plej karaj kaj spirite la plej proksimaj al mi estas miaj du filinoj, la plej aĝaj. Ili nun forestas de la hejmo, tial do mi iom enuiĝas sen ili. Li amike ekridetas kaj daŭrigas enpense :

— Mi nun tute alproksimiĝas al la morto, kiu estas tiel terura kaj nekomprenebla al vi, la junaj...

Victor LEBRUN.

---

(1) *3.000 oraj francaj frankoj.*

HARFAJNAJ RADIKETOJ

Retrofolumiante libron post libro, oni povas sekvi per la okuloj kiel operas laŭ nia klarigo la hodiaŭa familia nomo Fouque, antaŭe Fouques, fine Foquos, tio estas Fokos ; kiel la os disrompiĝis de **Janos** kaj de la nomo estiĝis **Jean**, Kiel **Béressi** ŝanĝiĝis je **Bressi, Por** je **Porré, Màrton** je **Marton** kaj **Fàbri** je **Fabrès.** Papp fariĝis Sappe tutsimple, ĉar la franca parohestro, skribante la majusklan p de malsupre al supre, tiel larĝigis ĝin ĉe ĝia supro, ke ĝi povis esti ankaŭ la majuskla s kaj, ĉar por li Papp ne havis sencon, male Sappe havis : ĝi signifas serpon.

La entuziasmaj membroj de la Historia Komitato, kun la helpo de ilia hungara amiko bone scianta ankaŭ latinon, opiniis, ke ili malkovris ĝis nun la spuron de preskaŭ ducent kvindek hungaraj familioj. Ĝi estas grandega nombro. Ni pripensu : en kiom da hungarlandaj vilaĝoj eblus spuri la devenon de la hodiaŭaj loĝantoj tra tricent - kvarcent jaroj ?

Dum horoj ni profundiĝis en la laŭsilaban legadon de mucidaj, polvoplenaj pergamenoj tiomgrade, ke eĉ mi mem povas kontribui al la komuna laboro per la malkovro de eta informo.

En unu el la bapto-enskribaĵoj de la analoj de 1660. la nomoj de la gepatroj estas Louiza Bourquas kaj György Agnol. Kio povas esti Bourquas, oni ne scias, sed malantaŭ Agnol evidente kaŝas sin Angyal. Sed la plej grave estas, ke antaŭ Agnol oni ne skribis la baptonomon franclingve Georges, sed la o estas ankoraŭ punktita : György oni skribis aŭ diktis.

Ankaŭ mi gapis al ĝi, sed mi ankoraŭ dubis.

Ĉu do en 1660 oni ankoraŭ parolis hungare en la vilaĝo, aŭ ĉu estis tiuj, kiuj ankoraŭ parolis ankaŭ hungare ? Hungarece ili skribigis siajn nomojn.

Laŭ informoj devenantaj de aliloke, la koloniantoj venintaj ĉi tien geedziĝis ekskluzive inter si tra tri generacioj. Poste ili komencis miksiĝi kun la praloĝantaro denove penetranta en la montojn. Estas neniu indiko, ke ili iam havis interrilatojn kun la Danuba-Tibiska patruio, krom se ilia pastro, vivanta ĉe la fino de la 17-a jarcento, venis de tie post ili. Ankaŭ sian strangan nomon ĉiufoje — tra jardekoj — li tiel subskribas hungarece : Szörme, aŭ pli guste Szörmé, por ke laŭ la franca ortografio, la e ĉe la fino de lia nomo ne estu silenta. Mi rigardis ĝin dufoje, eĉ trifoje, sed tiel ĝi estas, kvankam Szörme estas sufiĉe malofta hungara nomo.

Sed kiel ajn interesaj estas ĉi tiuj informoj, tamen mia ĉefa zorgo — intence regante min — ne estas ilia sekcado. Mi ja ne estas lingvisto. Mia ĉefa zorgo — nun mi ripetas — estas la analizo de tiu animstato, la difino de tiu spirita soifo, kiu volas ankaŭ per sekaj lingvistikaj informoj.

Neniam estas pli bona la okazo por ĝia malkovro kaj analizo.

Ni elvenis el la « mairie » kaj rigardis la preĝejon kaj la fortikaĵon, kiu post tiu tempo denove ruiniĝis. Ni iris antaŭ la monumenton de la herooj de 1914-1918 ; ĉiu tria nomo estas tia hungara nomo enkapsuliĝinta en la franca lingvo. Ĉi tie ni sidas — nun jam proksimume dek-kvinope — ĉirkaŭ la tabloj elmetitaj antaŭ la **Café du Cours,** sub la preskaŭ tro varma tagmeza suno. Ankaŭ ĉi tie estas iuspeca fortikaĵ-remparo. Antaŭ ni sube, senfine etendiĝas la arĝentgriza kaj rustruĝa provenca pejzaĝo. Dekstre estas svarmo da infanoj en ĉemizmanikoj kaj mallongaj pantalonoj, kurantaj tien kaj reen. Maldekstre, same en ĉemizmanikoj, estas aro da viroj. Post longa mezurado ili alten svingĵetas brilajn ferglobojn al malproksimaj celpunktoj. Ili ludas la konatan globludon de la francoj. Sed de tempo al tempo ili atentas pri la jam ŝerca konversacio fluanta ĉi tie — pri nia spirita ludo.

Mi sentas, ke la okazo estas favora por kolekti opiniojn. Ĉirilate mi ne kutimas sekvi la metodon de la kaŝemuloj, nek la metodon de tiuj, kiuj deflanke alproksimiĝas al la esenco, malplej en la societo de la tiel nomataj « simplaj homoj ». Mi rakontas, kvazaŭ ĉe malfermo de asembleo, kio absorbas min kiel sekvo de ĉi tiu bela renkontiĝo, la « revido ». Ankaŭ ili diru sian opinion : kio kunligas nin — je la distanco de kvarcent jaroj ? Kial ni ĝojas pri ĉi tiu interkonatiĝo, kiu povas havi nenian « realan » daŭrigon. Ni vere interkonatiĝu !

— Ĉar ni bone fartas ! — diras fraŭlino Mireille-Agnès Bagarre, ruĝiĝante, eble pro tio, ke la vortoj elvenis el ŝia buŝo tro entuziasme, aŭ eble pro tio, ke ŝi — kiel ni mem jam povis vidi en ŝia nomo — estas nur duone kalkulebla kiel hungardevena, kvankam ŝi estas unu el la plej fervoraj anoj de la esplor-grupo. Ni Jam ekkonis ŝin hieraŭ, kiam ŝi kun Marcel Jean venis ĝis Draguignan akcepti nin kaj ili aliĝis al ni en sia aŭtomobilo, irante antaŭ la nia, por ke ni ne devojiĝu sur la montaj vojoj : [post kiam kune kun ili ni jam rigardis la tiean memortabulon de Sàndor Kisfaludy].

— Sed kial ni bone fartas ? Ĝuste tio estas la demando !

— Ĉar por la honestaj homoj ĉiu okazo estas bona, por ke ili kunestu — diras pripenseme Gabriel Sappe.

Pri tio oni jam povas mediti.

Sokrato frekventis la agoron por disputi inter la botistoj. Li portis hejmen tiajn « simplajn » frazojn kiel abutmenton de sia filozofio.

Ankaŭ la ĉi-tiea senafekta frazo ŝajnas taŭga por esti apogkolono de ajna scienca disertacio, kiel malfrua kontribuaĵo al la tiel nomata amaspsikologio, plej ŝatata tereno de niaj oftaj student-debatoj.

Originala titolo :

Hajszàlgyökerek

de ILLYÉS Gyula

ELHUNGARIGIS EVA KAJ BERNARD GOLDEN

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬA PROBLEMO

Patroj kaj filoj

Estu **x** la nombro da libroj aĉetitaj de unu el la patroj ; x ankaŭ estas la kosto de ĉiu libro aĉetita. Se **y** estas la nombro da libroj aĉetitaj de la filo, oni povas skribi :

$$x^2 - y^2 = 15$$

x kaj y estas entjeroj (nombroj de libroj). Tiam ekzistas nur du solvoj por tiu problemo :

x = 4	x = 8
y = 1	y = 7

Plie Jako aĉetis tri librojn pli ol Ludoviko. Do, Jako aĉetis 7 librojn kaj Ludoviko 4, kaj Petro aĉetis 8 librojn kaj Andreo 1.

Konklude, Petro estas la patro de Jako kaj Ludoviko estas la patro de Andreo.

Kalkulu !

$$1 + 2^3 + 4^5 + 6^7 + 8^9 = 134\,498\,697$$

1
8
1 024
279 936
134 217 728
---
134 498 697

Komune...

Ili ĉiuj estis unuokululoj.

Trovu la koloron

Oni devas trovi triangulon kiu estas samtempe rektangula kaj egallatero. Tio estas ebla nur en sfera trigonometrio. Plie, unu latero estas en la nord-suda direkto (meridiano), kaj la alia en la okcident-orienta direkto (paralelo). Necesas do ke la ĉasisto estu precize sur la norda poluso. La urso ne povas esti alia ol blanka urso.

Krucvortoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1	K	A	T	E	D	R	A	L	O	■
2	A	M	O	N	I	A	K	O	■	E
3	T	O	N	■	A	B	A	T	E	J
4	E	N	■	A	M	E	N	■	■	F
5	D	I	A	M	A	N	T	■	M	E
6	R	A	B	E	N	O	■	D	A	L
7	A	K	A	N	T	■	K	O	R	T
8	L	O	T	■	■	D	O	R	M	U
9	O	■	E	■	M	A	R	M	O	R
10	■	E	J	F	E	L	T	U	R	O

NOVAJ PROBLEMOJ

Trovu la proverbon !

Jen listo de 22 vortoj : 1. okupo, 2. bruno, 3. piedo, 4. parko, 5. arako, 6. ŝelko, 7. mielo, 8. pulmo, 9. slipo, 10. amelo, 11. sango, 12. klavo, 13. marko, 14. akiri, 15. tramo, 16. falko, 17. sakro, 18. ferio, 19. gloro, 20. legio, 21. riski, 22. kalko.

Al ĉiu el la ĉi-supraj vortoj aldonu sesan literon tiel, ke vi povos formi sesliterajn vortojn, kies mallongaj klarigoj respektive estas : 1. bileto ; 2. juvelo ; 3. kartludo ; 4 arbeto ; 5. malsano ; 6. veturilo ; 7. aroma vegetaĵo ; 8. elemento ; 9. kurba linio ; 10. siropa restaĵo ; 11. longa ferpeco ; 12. litero ; 13, senluma kesto ; 14. duon ridi ; 15. ordonanto ; 16. regnestro ; 17. fiŝo ; 18. malŝatata loko ; 19. birdeto ; 20. ia fermilo ; 21 labori ; 22. subtera kanalo.

La novaj literoj en la donita sinsekvo formas proverbon.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

DIFINO (PIV)

ĈE esprimas senperan tuŝecon kaj proksimecon al IU aŭ IO.

En la spaco :

1) **Rilate al objekto, parto de objekto, korpoparto.** — ĉe la muro staris granda ŝranko — pordo ĉe komenco de vojo — kapti iun ĉe la brako.

2) **En homa aktiveco :** li ne povis teni ĉe si sekreton — labori ĉe profesoro — mia konto ĉe vi — ĉe iu elfalis la haroj.

3) **En la domo, lando verko de iu aŭ io :** mi loĝas ĉe mia frato — tiu eraro estas ofta ĉe komencantoj.

En la tempo :

ĈE montras koincidon inter ago kaj cirkonstanco :



Ĉe kiun ?

Ĉe ĉiu gluto da supo mi elspiras saponveziketojn. Verŝajne la kuiristo eraris : anstataŭ fari sian aĉeton ĉe la buteristo li iris ĉe la saponvendiston.

— **li malaperis ĉe la koka krio** — li ekscitiĝis ĉe la plej malgranda bagatelo.


Akuzativo post ĈE por esprimi almovon (PIV)

— Iri ĉe la onklon, ĉe la dentiston — venu ĉe mian malsanan patrinon.
SED : mi iras kaj reiras ĉe mia onklo kun kiu mi disputas.
(Zamenhof preferis uzi « al »)



Ĉe kampadejo

Mia patrino petas de vi, ke vi prenu la saman televidstacion kiel ŝi : ŝi certigas, ke ĉe la via estas nur stultaĵoj dum ĉe la sia estas nur interesaĵoj tute ne sen parazitoj.



Ĉe decida momento

Finfine diru kion vi preferas : aŭ kune ni restas ĉe ni, aŭ vi reiras ĉe vian karan patrinon, aŭ estas mi, kiu reiras ĉe mian gepatran neston.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (120 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (220 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (2,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (35 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, Donnerink 10 C 20 05800 **Hyvinkää** (23 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (15 mk.).

Hispanujo : S-ro Manuel Romero Gomez, Arzobispo Apaolaza, 32-Ent. A ZARAGOZA (320 pes.)

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (2 500 lires).

Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (80 d.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (15 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (30 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336 Dto 200 BARRANCO (Lima).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO.

Rumanio : S-ro Radu Pàtrascu, str. Pompiliu Manoliu 13 Bl. G2 ap. 75-7000 Bukareŝto-39.

Sovetunio : S-ro Alik Melnikov, ab jaŝ 393 Rostov Don — 7.

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (24 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond. Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Jones R. Kent, 3318 N. Lake Shore Drive, n° 801, CHICAGO, Illinois 60 657.

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per respondkuponoj (20 respk.).



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier — Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1976, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

C'est dans la poussière de plâtre que s'est déroulée la semaine espérantiste de Printemps. En effet, comme nous le craignions et malgré les promesses, les travaux n'étaient pas terminés. Mais la bonne humeur fit oublier les planchers gris. Le travail des jeunes et des moins jeunes (il semble que l'état civil avait menti car nous n'avons pas vu de personnes âgées) a été intense pendant les cours, la préparation de la soirée finale, la réalisation du petit fascicule « Printempa Semajno ». Il n'y avait que deux espérantistes étrangers, des adultes. Mais ce stage a été enrichissant sur le plan de la langue aussi bien que sur celui des relations et des échanges. La collaboration des générations a été parfaite et le beau temps a été de la partie.

Et maintenant, les chambres nouvellement refaites sont la proie des tapissiers et peintres bénévoles. Une équipe d'amis manie allègrement le pinceau et la brosse. Le travail avait été préparé pendant une semaine par nos amis Prévot.

L'Assemblée générale a eu lieu le 28 mars. Vous pouvez en voir le compte-rendu dans ce numéro. Je ne commenterai donc pas ses travaux. Mais je voudrais insister sur deux décisions prises : d'abord l'appel fait aux prêteurs pour qu'ils transforment leur prêt en parts de sociétaire. Déjà en 1975 quelques amis l'ont fait ce qui a permis d'alléger la dette a court terme de 5 650 francs. Je ne peux qu'engager tous les amis qui le peuvent à suivre l'exemple. Deuxième décision : régler au mieux la question des membres dont la convocation nous revient depuis plus de cinq ans, c'est-à-dire essayer de retrouver leur domicile actuel. La liste en paraîtra dans la revue. Vous pouvez nous aider en nous signalant les adresses nouvelles que vous connaissez.

Pour les séjours d'été il est temps de vous décider. Les adhésions nous arrivent régulièrement et pour la première période le nombre des places est dès maintenant limité. Vous savez bien, parce que vous en avez fait l'expérience ou parce que des amis vous l'ont dit, qu'à Grésillon on trouve une ambiance unique. Demandez aux stagiaires qui viennent de quitter le château après la semaine de printemps. Eux aussi sont partis à regret. Pressez-vous.

P. BABIN.

Nos joies

Ramona et Juan Lluis Valles-Ferrer nous annoncent la naissance de leurs fils Ermengol. Tous nos compliments aux parents, et nos vœux à Ermengol.

Hervé Gonin nous a fait part de la naissance de sa fille. Toutes nos félicitations au jeune président d'U.F.E. et à son épouse ainsi qu'aux grands-parents, nos amis M. et Mme Raymond Gonin, dont nous partageons la joie.

LA REVUE

Les abonnements nous arrivent régulièrement. Mais aucune liste d'abonnés bienfaiteurs ne paraîtra dans ce numéro. Il nous fallait en effet publier les noms des membres de notre association dont nous sommes sans nouvelles depuis plusieurs années.

Changement dans le déroulement des épreuves pour le CERTIFICAT DE CAPACITE

Dorénavant, l'épreuve écrite aura lieu dans le courant de l'année scolaire, sous la surveillance d'une seule personne détentrice du Brevet de pédagogie et agréée par le directeur des examens. L'écrit sera ensuite envoyé à ce **dernier.**

Les épreuves orales n'auront lieu que pour les candidats ayant satisfait à l'écrit et lorsqu'il sera possible, parexemple lors de congrès ou à Grésillon, de réunir trois détenteurs du Brevet de pédagogie, et dans les conditions habituelles.

Il ne devra pas s'écouler plus de deux ans entre l'écrit et l'oral.

Toute correspondance relative aux examens doit être adressée à la directrice des examens : Mme J. Vincent, rue des Oiseaux, 27700 Les Andelys ; C.C.P. Rouen **574 88 R.**

Assemblée Générale du 28 Mars 1976

231 personnes possédant un capital social de 56.900 F étaient présentes ou représentées.

La séance est ouverte à 10 h., M. Boyet est désigné comme président de séance. Le quorum étant atteint, l'assemblée peut délibérer valablement.

Le compte d'exploitation laisse apparaître une nette augmentation des recettes due à l'augmentation des prix de séjour, mais aussi de leur nombre et de leur durée. De même, les recettes tickets et librairie sont en augmentation. Les dépenses d'entretien ont été maintenues à leur niveau de 1974.

Le bilan montre une augmentation du capital social (5 parts remboursées et 84 parts nouvelles souscrites) qui passe à 94.200 F. Les disponibilités s'élèvent au 31 décembre 1975 à 83.150,06 F.

L'assemblée générale adopte le rapport financier à l'unanimité.

MM. Prévot et Berthelot ont été désignés comme commissaires aux comptes.

La dette à court terme est en diminution de 5.650 F à la suite des demandes de remboursements ou de transformation en actions.

Les stages 1976 s'annoncent bien. De nombreuses inscriptions sont déjà enregistrées. Quelques passages sont annoncés pour le printemps.

Divers travaux sont en cours dans le château. La chambre 3 est divisée en deux. Les chambres 4 et 5 sont remaniées. Le nombre de lits disponibles reste le même, mais on disposera d'une chambre supplémentaire. Pour ces travaux, le gros œuvre est terminé, et les chambres pourront être remises en état rapidement.

Avec ces travaux, toutes les chambres disposeront maintenant de l'eau chaude.

La salle de conférence est terminée. Une centaine de chaises ont été achetées. Il faut maintenant envisager le remplacement de l'appareil de projection ainsi que l'achat d'un écran.

Divers travaux seront entrepris dans les communs dont la réparation des gouttières afin de préserver les murs et la réparation d'une remise. D'après les devis établis, 7.000 F seront engagés dans ces travaux.

Le renouvellement de la moitié des membres du conseil d'administration avait lieu cette année. Les conseillers sortants étaient Mmes Mathé et Micard, MM. Bodereau, Guillaume, Dairon et Jelenc. Tous se représentaient. Une nouvelle candidature s'était manifestée : celle de Mme Vincent.

201 bulletins de vote ont été comptabilisés. 10 bulletins se sont révélés nuls.

Ont obtenu :

Mme Micard, 187 voix, élue.
M. Dairon, 184 voix, élu.
Mme Mathé, 183 voix, élue.
M. Guillaume, 171 voix, élu.
M. Bodereau, 168 voix, élu.
M. Jelenc, 168 voix, élu.
Mme Vincent, 80 voix.

Le secrétaire de séance
R. Jelenc.

Association culturelle du Château de Grésillon

Adhésion minimum : 5 Frs. — C.C.P. Nantes 25 12 17

Listes des donateurs

Dieusaert (92)	10,00	Mac Lennan (Angleterre)	7,50
Robert (13)	5,00	Bénaïm (47)	20,00
Amouroux (66)	20,00	Furlan (50)	5,00
Micard (53)	5,00	Drillien (71)	5,00
Micard (14)	5,00	Goudé (49)	9,00
Lebrun (72)	5,00	Benaïm (47)	20,00
Chasseriaud (17)	5,00	Battlori (Espagne)	5,00
Caphez	5,00	Tulasnes (49)	5,00
Kraemer (54)	100,00	Turbillon (37)	5,00
Beau Jean (13)	100,00	Mas (Maroc)	11,00
Villegier	20,00	Belon (06)	50,00
Directeur Hop. (49)	10,00	Rossignol	20,00
Schertzer (67)	10,00	Brezinski	19,00
Mathé (86)	65,00	Clady	100,00
Rapley (Angleterre)	18,00		

LISTE DES SOCIETAIRES DE LA M.C.E. DONT NOUS N'AVONS PLUS L'ADRESSE DEPUIS QUELQUES ANNEES

Mlle BOISSIER	autrefois en résidence à	Angers.
M. CASTEL	»	Carcassonne.
Mlle CAYREL	»	Espalion.
Mlle CLEON	»	Chatillon s/Dordogne.
Dr. COUTURIER	»	Mouliherne.
Mlle ESTRADE	»	Gagny.
M. FALCONNIER	»	Albens (73).
Mlle FAUTH	»	Melsheim.
Mlle FELGEIROLLES	»	Clamart.
M. GAUTHIER	»	Authon (41).
Mlle GERAULT	»	Crépy en Laonnois.
M. GILBERT	»	Thiers.
M. HOURIEZ	»	Achicourt (62).
M. JENNEQUIN	»	Avion (62).
Mme JOUARD	»	Montluçon.
M. LACOUR	»	Thiers.
Mme LE ROCH	»	Rezé (44).
M. MARIN	»	Montreuil s/Bois.
M. MENDLEWICH	»	Lens.
Mme METTIER	»	Juranville (45).
Mlle NICOLAI	»	Secteur Postal Allemagne.
M. NICOLONI	»	Marseille.
Mlle PHILIPPOT	»	Toulouse.
M. RENOU	»	Commentry.
M. RETOT	»	Paris.
M. ROUX	»	Orléans.
Mme ROCHETTE	»	Largentière (07).
M. STIENNE	»	Licques (62).
M. THOLLET	»	Kenitra (Maroc).

Si vous connaissez l'adresse actuelle de l'une de ces personnes, vous nous rendriez service en nous la faisant parvenir.

Merci d'avance.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon :	
noires :	0,60 F.
couleur :	0,80 F.
Cuillères de colection :	13,00 F.
Pendentifs :	12,00 F.
Disques de stationnement :	4,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	2,00 F.

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.
Demandez notre catalogue

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin
Prix : **10,00 Fr.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE CATALOGUE...

... aujourd'hui,

Des œuvres du D-r Zamenhof

Fundamento de Esperanto : broché, 14 frs - relié, 18,50 frs.

Lingvaj Respondoj : broché, 8,50 frs - relié, 11 frs.

Hamleto (illustré) : relié, 15 frs.

Marta (illustré) : relié, 18 frs.